

STATUTO de Hungaria Esperanto-Asocio

En unuecigita strukturo

Hungaria Esperanto-Asocio estis fondita en 1902 sub la nomo Unuiĝo de Hungaraj Esperantistoj. De 1960 ĝi funkciis sub la nomo Hungara Esperanto-Asocio, kaj surbaze de la Leĝo de la jaro 1989 § 15 alineo (1) pri la unuiĝa juro la Ĉefurba Tribunalo registris ĝin sub ĉi tiu nomo la 20an de novembro sub akto n-ro 556. Sian aktualan nomon (Hungaria Esperanto-Asocio) ĝi alprenis la 1an de junio 1991.

Konforme al la celoj, difinitaj en la Statuto, la Asocio certigas la funkciadon de la Asocio laŭ demokratia, aŭtonomia principo, antaŭenigas la efektivigon de la rajtoj kaj devoj de la membroj.

En la Ĝenerala kunveno de la **12a de decembro 2021** Hungaria Esperanto-Asocio **modifis kaj metis en unuecan strukturon la tekston de la Statuto kompare al la teksto de la Statuto de la 18a de decembro 2016 (kompare al la teksto de la Statuto de la 18a de decembro 2016 la modifoj estas markitaj per grasaj kursivaj literoj. La forstrekitaj dispozicioj estas markitaj per trastroko de la grasaj, kursivaj literoj).**

Ĉapitro 1

Datumoj de la Asocio

1. Nomo de la Asocio hungare: Magyarországi Eszperantó Szövetség, mallongigo de ĝia hungara nomo: MESZ. Ĝia nomo en Esperanto: Hungaria Esperanto-Asocio (plue: Asocio). Mallongigo de ĝia nomo en Esperanto: HEA.
2. Sidejo de la Asocio: 1146 Budapest, Thököly út 58-60. (OKISZ Inkubátorház).
3. La Asocio estas internacia kaj enlanda civila organizo, funkcia sur federacia bazo.
4. La kontrolon pri leĝeco de la Asocio plenumas la prokuroraro.
5. La oficialaj lingvoj de la Asocio estas Esperanto kaj la hungara.

Ĉapitro 2

Celoj, taskoj kaj statuso de la Asocio

1. Celoj de la Asocio: por la kreo de pli justa internacia komunikada sistemo informado de la socia medio pri la stato de la internacia komunikado, pri la internacia lingvo Esperanto kaj ĝia komunumo; varbo de novaj membroj kaj subtenantoj por la komunumo; antaŭenigo de la alproprigo kaj aplikado de la internacia lingvo Esperanto, flegado kaj riĉigo de la lingvo Esperanto kaj ties kulturo; organizado de la agado de ĝia membraro por ties realigo.
2. Por la realigo de la celoj de la Asocio ĝi kunlaboras, sendepende de la landlimoj, kun ĉiuj ŝtataj, sociaj kaj ekonomiaj organizoj, aliaj societoj kaj asocioj, kiuj kunhelpas la realigon de la sukcesa agado kaj celoj de la Asocio.
3. La Asocio estas jura persono, kiu, por krei la materialajn kondiĉojn por la realigo de siaj celoj, povas plenumi laŭ la leĝaj preskriboj ekonomian, entreprenan agadon, krei ekonomian societeton kaj fondaĵon, aliĝi al tiaj kiel membro, eldoni bild- kaj sonportajn materialojn. La Asocio faras ekono-

mian-entreprenan agadon, nur por realigi siajn celojn, difinitajn en la Statuto, tamen ne endanĝerigante tiujn. Ĝi mastrumas memstare la havaĵon de la Asocio. La atingojn el sia ekonomia mastrumado la Asocio ne dividas, ĝi utiligas ilin por la sukcesigo de siaj laŭstatutaj agadoj kaj celoj. Sub la nomo de la Asocio ĝi povas alpreni rajtojn kaj devojn, speciale ĝi povas akiri havaĵon, konkludi kontraktojn, iniciati procesojn. Por la ŝuldoj de la Asocio ĝi respondecas per la propra havaĵo. Krom pagi siajn kotizojn, la membroj ne respondecas per siaj havaĵoj por la ŝuldoj de la Asocio.

4. En la kadro de sia agado la Asocio konkludas siajn kontraktojn memstare, laŭ sia bontrovo kaj volesprimo libere, por realigi siajn celojn. La rajtigo resp. devigito de la kontraktoj, konkluditaj de ĝi, estas la Asocio.

5. La Asocio estas kultura organizo, kiu informas la socian medion pri la aktualaj demandoj de la internacia komunikado, pri la lingvo Esperanto kaj ties komunumo; subtenas kaj antaŭenigas la instruadon de la lingvo Esperanto, kaj por ĉi tiu celo organizas kursojn, klerigojn, informadojn, enlandan kaj internacian kunlaboradon. Ĝi instigas siajn membrojn al regula memklerigo, perfekta alproprigo de la lingvo Esperanto kaj ellerno de pluaj lingvoj.

6. La Asocio plifortigas en siaj membroj la humanisman vidmanieron, strebon al paco, ekkonon kaj respekton de la komunaj valoroj de la homaro, la konscion de la interdependeco kaj respondeco por la tuta homaro kaj ties medio.

7. La Asocio agadas kiel parto de la tutmonda Esperanto-movado. Ĝi partoprenas la laboron de internaciaj Esperanto-organizoj. Per la apliko kaj disvastigo de la Internacia Lingvo ĝi plifortigas en siaj membroj la komprenemon, toleremon al diversaj nacioj kaj kulturoj, ekkonon kaj konigon de la diversaj kulturoj kaj valoroj de aliaj nacioj. Por tio ĝi reprezentas la hungariajn esperantistojn, ties organizojn en la internacia Esperanto-vivo kaj en eksterlandaj aranĝaĵoj; en la kadro de reciproka kunlaboro ĝi tenas kontakton kun esperantistaj organizoj de aliaj landoj.

8. Per la plifaciligado de la komunikado inter individuoj kaj grupoj kun diversaj gepatraj lingvoj la Asocio instigas kreon de senperaj, personaj kontaktoj. Tiel ĝi kontribuas al estigo, disvolvo de internaciaj, kulturaj kontaktoj.

9. La Asocio difinas surbaze de la spiriteco kaj principoj de la demokratio siajn organizon kaj agadon. Konforme al tio ĝi kunigas la Esperanto-agantojn – sen konsidero al naciaj, rasaj, seksaj, religiaj, politikaj, lingvaj, sociaj diferencoj kaj ŝtataneco.

10. Baza funkcia principo de la agado de la Asocio estas la homaj rajtoj, speciale la rajto de la individuo je la konservo de la propra lingva identeco, ties respekto kaj validigo de ĉi tiuj rajtoj. Konforme al tio la Asocio povas alpreni starpunkton surbaze de la principo de la ĉesigo de lingva diskriminacio, aparte en lingvoaplikaj, lingvoinstruaj demandoj, tuŝantaj la proprajn celojn kaj agadojn, kaj en ceteraj, lingvorilataj demandoj, starigitaj enlande aŭ en internaciaj kontaktoj.

11. Pri politikaj demandoj la Asocio estas neŭtrala. La Asocio ne rajtas havi organizajn unuojn aŭ aliĝintajn societojn, organizitajn sur politika bazo. Krom lingvopolitikaj demandoj neniu organo, aliĝinta societo, oficohavanto, individua membro de la Asocio rajtas esprimi kiel tia starpunkton pri politikaj aferoj. La Asocio faras nenion senperan politikan agadon, ĝia organizo estas sendependa de partioj kaj ne donas al tiuj materialan subtenon.

12. La aprobon de la plej alta organo de la Asocio bezonas aliĝinta societo, alia Esperanto-organizo, por alpreni nomon, similan al aŭ konfuzeblan kun la nomo de la Asocio. Pere de sia plej alta organo la Asocio devas protesti kaj fari la necesajn dispoziciojn kontraŭ la portado de tiaj nomoj fare de ĉiuj organizoj, kies nomoj estas konfuzeble similaj al tiu de Hungaria Esperanto-Asocio, aŭ kiuj organizoj / individuoj konjektigas resp. ŝajnigas apartenon al Hungaria Esperanto-Asocio, kaj kiuj misuzas la nomon de la Asocio. Inkluzive la misuzon de la domajnonomo kaj okazojn, kiam uzante aŭ misuzante la aspektigajn elementojn, nomon de la Asocio, oni plenumas enspezigan agadon sur la kampo de libroeldonado, instruado aŭ ceteraj kampoj.

13. La Asocio devas, pere de sia plej alta organo, malhelpi ĉiun agon, agadon, kiuj kaŭzas al la Asocio ĉu materialan, ĉu moralan malavantaĝon, damaĝon, malhelpas la Asocion ĉe la atingo de la propraj

celoj, miskreditigas la bonan famon de la Asocio. La Asocio devas pere de sia Estraro elpaŝi kaj fari la necesajn dispoziciojn (respondecajn, disciplinajn, pun-, civilprocesajn, kontraŭdeliktajn ktp) kontraŭ ĉiu tia ago de membro, oficohavanto aŭ asocia organo, kiu estas kontraŭa al la Statuto, Regularo aŭ validaj juraj normoj aŭ kolizias kun ili. Inkluzive la okazon, kiam membro, oficohavanto faras dispoziciojn sen aprobo de asocia organo aŭ sen rajtigo – kun escepto de neprokrasteblaj kaj eksterordinare urĝaj dispozicioj.

14. La Asocio plenumas ankaŭ la subajn agadojn:

- Okazigo de kulturaj, instruaj kaj publikklerigaj programoj rilataj al la lingvo Esperanto kaj plenumado de ceteraj rilataj agadoj.
- Por la diskonigo, disvastigo de la lingvo Esperanto ĝi aranĝas publikajn programojn (ekz. liber-tempajn kaj sportajn eventojn, kampadojn, klubvesperojn, prelegojn, konferencojn, kongresojn).
- La Asocio instigas al la alproprigo de la lingvo Esperanto, por tio ĝi organizas kursojn, eldonas librojn.

Ĉapitro 3

Membraro de la Asocio

1. La Asocio havas individuajn kaj aligitajn membrojn.

2. En la Asocio rajtas membriĝi ĉiu hungara civitano, plenuminta sian 14an jaron, se li akceptas la Statuton de la Asocio.

2.1.1. La akcepto de membro okazas surbaze de membriĝa deklaro, pago de la jarkotizo, plenigo de la membreregistra folio kaj enskribo en la membreregistron, pri kio zorgas la Estraro. Post fondo de la Asocio la membreco estiĝas per akcepto de la membriĝa deklaro. La membriĝan deklaron, subskribitan de du atestantoj kaj la petanto oni devas prezenti al la Estraro, kiu, ene de 60 tagoj post la alveno de la peto decidas pri la membriĝo per simpla plimulto de la voĉoj, pere de nesekreta voĉdonado. La Estraro devas sendi sian decidon ene de 15 tagoj post ties alprenado en skriba, atestita formo al la petanto de la membriĝo. Ĉe rifuzo de la membriĝa peto jura riparo estas ekskludita.

La akceptita membro devas pagi sian jarkotizon ene de 30 tagoj post la enmanigo al li de la decido pri membriĝo.

2.1.2. La alprenado de decido pri rifuzo de membriĝo apartenas al la kompetento de la Estraro.

2.1.3. Asocia membro povas esti samtempe ankaŭ membro de pluraj organizaj unuoj ene de la Asocio.

2.1.4. Membro povas elekti kaj esti elektita por iu ajn ofico de la Asocio en la organizaj unuoj, al kiuj li apartenas.

2.1.5. Devo de la membro estas pagi ĝis limdato la kotizon, difinitan de la Ĝenerala kunveno, kio povas okazi perpoŝte, per ĝiro al la bankkonto de Hungaria Esperanto-Asocio kaj persona pago. La jarkotizo estas pagenda ĝis la 30a de aprilo de la koncerna jaro. Ĉe malfrua pago la membro ne rajtas praktiki siajn rajtojn ĝis la pago. Se la kotizpago ne okazas ĝis la 31a de decembro de la koncerna jaro, oni devas averti skribe, en atestebla formo la koncernan membron pagi, kun 30-taga nova limdato, la neplenumitan kotizon. Se ankaŭ la 30-taga nova limdato pasas senrezulte, la Asocio ekskludas, konforme al Ĉapitro 3, la membron.

2.1.6. Pensiuloj, atingintaj la por ili validan pensiulan aĝolimon kaj ĉeestaj lernantoj de mez- aŭ supergradaj lerninstitutoj rajtas havi rabaton por la jarkotizo.

2.1.7. Krom pago de la kotizo la membro ne devigeblas al aliaj materialaj servoj. La membro ne respondecas por la ŝuldoj de la Asocio, malinkluzive la de li dole kaŭzigitajn damaĝojn, materialajn malavantaĝojn.

2.1.8. Rajtoj de la membro:

- a) li povas partopreni la agadon kaj aranĝaĵojn de la Asocio, fari rimarkojn, proponojn, esprimi opinion lige kun la funkciado de la Asocio;
- b) li povas fari proponojn por pritraktado de demandoj, koncernantaj la Asociacion;
- c) li povas peti informojn en afero, iniciatita de li, pri la agado, dispozicioj de la Asocio kaj Estraro, al kio la Estraro devas reagi ene de 60 tagoj;
- d) li povas elekti aŭ esti elektita en afergvidajn kaj reprezentajn organojn aŭ por la oficoj de la Asocio;
- e) li povas submeti proponojn por la tagordaj punktoj de la Ĝenerala kunveno kaj kunsidoj de la Estraro;
- f) li povas fari enrigardon en la registrojn, dokumentojn de la Asocio;
- g) triono de la membroj povas iniciati skribe, kun indiko de la kaŭzo kaj celo, eksterordinaran kunvokon de la Ĝenerala kunveno kaj eksterordinaran kunsidon de la Estraro;
- h) li povas ekkoni la planojn kaj celojn de la Asocio, partopreni la procezon de ties formado;
- i) konforme al la Regularo li povas uzi la servojn de la Asocio (la Estraro povas ligi, krom la membreco, ankaŭ al aliaj kondiĉoj la uzon de certaj, nombre limigitaj servoj kaj favoraĵoj).

2.1.9. Iu ajn membro rajtas ataki antaŭ tribunalo leĝorompan decidon de la Asocio aŭ iu ĝia organo ene de 30 tagoj post ties konatiĝo. Kun la paso de unujara, jurperdiga limdato post la alprenado de la deida proceso ne iniciateblas.

2.1.10. La membro devas:

- a) plenumi siajn devojn laŭstatutajn kaj taskojn alprenitajn en ĝeneral-kunvenaj decidoj;
- b) observi la Statuton, Regularon, decidojn de la Asocio kaj antaŭenigi ties laboron, la efektivigon de la starigitaj celoj;
- c) pagi la jaran kotizon;
- d) konservi, plimultigi la havaĵon kaj rimedojn de la Asocio.

2.2. Dumviva membro povas esti, kiu pagas en unu sumo la dudekoblaron de la ordinara kotizo, valida ĉe la pago. Per tio la dumviva membro sendeviĝas pagi pluan kotizon. Sed la dumviva membreco ne malhelpas la ĉesigon de la dumviva membreco fare de la dumviva membro aŭ la Asocio. Por la dumviva membro estas aplikendaj la dispozicioj, rilataj al la membro kun la diferenco, ke la dumviva membro ne ekskludeblas el la Asocio ĉe preterlaso de la kotizpago.

2.3. Per simpla plimulto de la voĉoj la Ĝenerala kunveno povas elekti honora membro personon aŭ membron, plenumantan elstaran agadon en aŭ por la Asocio. La honora membro sendeviĝas pagi kotizon. La honora membro povas partopreni la Ĝeneralan kunvenon kun interkonsiliĝa rajto, ne havante tamen voĉdonrajton kaj ne estas elektebla por la oficoj de la Asocio.

2.4. Naturpersonaj membroj de la Asocio povas praktiki siajn rajtojn ekskluzive persone. Jura persono kaj membroj de la organizo sen jura personeco povas praktiki siajn rajtojn pere de siaj reprezentantoj surbaze de reprezenta rajtigo, konforma al la leĝe postulata formaleco.

3. La individuaj membroj povas esti dumvivaj kaj honoraj membroj kaj ankaŭ honoraj prezidantoj.

4. La membreco de la individua membro ĉesas:

- a) kun la morto de la membro,
- b) kun la malfondo de la Asocio,
- c) kun la ekziĝo de la membro,
- d) kun la ekskludo de la membro,
- e) ĉe nepago de la kotizo.

4.1. La Estraro ekskludas el inter siaj membroj:

- a) la membron, kiu malhelpas la efektivigon de la enhavo de Ĉapitro 1, la celojn de la Asocio per sia al li ŝuldebla, kun la ideoj de la Asocio ne akordigebla konduto, rilatas neetike al la Asocio, al iuj ajn ĝiaj membroj, organoj, oficoj, aŭ malebligas la laboron de la Asocio aŭ de iu ajn ĝia organo;
- b) kiu grave malobservas la Statuton aŭ fariĝas neinda por la membreco en la Asocio pro alia, grava disciplina malobservo aŭ malobservo de ceteraj juraj normoj;

- c) kiu aliĝis al la Asocio por celo kontraŭa al la Statuto de la Asocio, por plenumo de kaŝa agado, kaj tiamaniere disvolvas sian agadon, aŭ agadas sen observi la celojn de la Asocio;
- d) kiu uzas la celojn, organizon, membraron de la Asocio, la Asocion mem kaj ties ideocon, fonon por celoj kontraŭaj al la interesoj de la Asocio aŭ por la propraj celoj aŭ tiuj de sia organizo;
- e) kiu ŝuldigeble damaĝas la havaĵon, rimedojn de la Asocio, kiu kaŭzas al la Asocio materialan damaĝon kaj moralan malavantaĝon, malutilas al ĝi, kiu mastrumas la havaĵon kaj rimedojn de la Asocio ne konvene, kaŭzante damaĝon, malutilon, kiu uzas sen permeso la havaĵon, rimedojn de la Asocio por propraj celoj;
- f) kiu preterlasas sian devon anonci, registriĝi sian membrecon, aŭ lige kun tio komunikas neverajn datumojn;
- g) kiu ne plenumas sian devon pagi la kotizon ĝis la 31a de decembro de la koncerna jaro, kaj ne pagas sian kotizon ene de la por li skribe, atesteble en averto preskribita nova limdato de 30 tagoj.

4.2. Pri la ekskludo de la membro decidita unuainstancas la Estraro. Pri la iniciato de ekskluda procedo oni devas informi la koncernan membron skribe, en atestebla maniero, kaj devas inviti lin al la kunsido de la Estraro, en kiu tiu prenas decidon pri lia ekskludo. En la estrara kunsido, decidanta pri lia ekskludo, la koncerna membro rajtas esprimi sian starpunkton. La decidon pri la ekskludo de la membro oni devas formuli skribe kaj provizi per motivado; la motivado devas enhavi la faktojn kaj pruvojn, bazantajn la ekskludon, plue informon pri jurrimedoj. La decidon pri ekskludo oni devas komuniki al la membro skribe, en atestebla maniero. La ekskludita membro rajtas protesti kontraŭ la decido en 15 tagoj post la enmanigo de la decido per skriba apelacio al la Ĝenerala kunveno, kiun li devas prezenti al la Estraro. En sia sekva kunsido la Ĝenerala kunveno decidita per 2/3 de la voĉoj de la ĉeestantaj membroj pri la kontraŭekskluda apelacio. La Ĝenerala kunveno ŝanĝas aŭ aprobas la decidon de la Estraro.

4.3. La intencon pri eksmembriĝo oni devas anonci skribe al la Estraro. La membreco ĉesas kun la deklaro, sendita al la Estraro.

4.4. La ĉeso de membreco ne liberigas la membron de la plenumo de siaj devoj, estiĝintaj dum kaj validaj por la tempodaŭro de lia membreco.

4.5. En disciplinaj aferoj de la membroj devas procedi anticipe laborteamo, nomumita de la Estraro, kiu post la klarigo de la faktoj submetas decidoproponon al la Estraro pri la necesaj dispozicioj.

5. Aligitaj membroj estas aliĝintaj societoj, kiuj akceptas la Statuton de la Asocio kaj devontigas sin per membriĝa deklaro aktive partopreni la laboron de la Asocio kaj pagi la kotizon. Pri akcepto de la aligita membro decidita la Ĝenerala kunveno.

5.1. Aliĝinta societo de la Asocio povas esti aŭtonomia esperantista organizo kun aŭ sen jura personeco, havanta sidejon en Hungario aŭ en aliaj membroŝtatoj de Eŭropa Unio (laŭ la juro de la membroŝtato), kiu

- a) akceptas la Statuton de la Asocio;
- b) per membriĝa deklaro devontigas sin aktive partopreni la laboron, efektivigon de la celoj de la Asocio parte kiel organizo, parte pere de siaj unuopaj membroj;
- c) regule pagas la jaran kotizon, difinitan de la Estraro;
- d) kies celoj parte aŭ plene koincidas kun la celoj de la Asocio, estas ne kontraŭaj al tiuj;
- e) ĝis la 30a de junio de ĉiu jaro liveras informojn pri la nombro de siaj membroj, post alvoko scipovas prui ties verfidelecon.

5.2. La aliĝinta societo pagas kotizan kontribuon al la Asocio konforme al la nombro de la faktaj, registritaj, ĉiujare fluktuantaj kaj por ĝi regule kotizantaj ordinara membroj, kaj proporcie al tio ricevas lokojn en la Ĝenerala kunveno. La tiel akireblaj ĝeneral-kunvenaj lokoj de la unuopaj aliĝintaj societoj estas en la koncerna jaro maksimume 5 personoj tiel, ke aliĝinta societo kun malpli ol 30 membroj rajtas delegi 1, kun 30-49 membroj 2, kun 50-99 membroj 3, kun 100-149 membroj 4 kaj pli ol 150 membroj 5 personojn en la Ĝeneralan kunvenon. La kotiza kontribuo egalas al 50% de la individua kotizo de HEA, multiplike per la membronombro de la aliĝinta societo aŭ laŭ okaza interkonsento.

5.3. Krom la reciproka kunlaboro la Asocio helpas la aliĝintan societeton ĉe la efektiviĝo de ties celoj ankaŭ per tio, ke la komisiito de la Asocio plenumas la reprezentadon de siaj aliĝintaj societetoj ĉe enlandaj organoj kaj en la Komitato de UEA (Universala Esperanto-Asocio).

Ĉapitro 4

Grupoj, komunumoj, fakaj organizoj

1. La membroj decidas mem, kian organizan unuon ili deziras krei ene de la Asocio. Ĉi tiuj organizaj unuoj elektas memstare kaj senpere siajn oficohavantojn laŭ sia regularo.
2. Organizaj unuoj
 - a) Grupo: organiza unuo de membroj kun sama loĝloko, sama laborloko aŭ sama interesiĝo, kiu agadas konforme al la celoj kaj taskoj de la Asocio.
 - b) Fakgrupo: organiza unuo de fake agantaj membroj kun sama laborloko, sama faktereno.
 - c) Faka sekcio: organiza unuo de fakgrupoj kaj individuaj membroj, agantaj en la sama aŭ koneksa faktereno.
3. La estroj aŭ komisiitaj membroj de la fakaj sekcioj, fakgrupoj kaj grupoj reprezentas sian societeton ĉe la rilataj enlandaj kaj internaciaj esperantistaj fakorganizoj.
4. La organizaj unuoj ne rajtas alpreni financajn devontigojn en la nomo de la Asocio, ili rajtas plenumi mastrumadon nur kun la skriba permeso de la Estraro kaj en maniero, difinita de ĝi.
5. La fakaj sekcioj, fakgrupoj kaj aliĝintaj societetoj de la Asocio informas ĉiujare la Estraron skriboforme pri sia kunlaboro kun internaciaj esperantistaj fakorganizoj kaj ties rezultoj.

Ĉapitro 5

Organizo de la Asocio

Organoj de la Asocio:

1. Ĝenerala kunveno
2. Estraro
3. Oficohavantoj:
 - 3.1. Prezidanto
 - 3.2. Ĝenerala vicprezidanto
 - 3.3. Ekonomia vicprezidanto
4. Revizora komisiono

1. Ĝenerala kunveno

1.1. La Ĝenerala kunveno estas la plej supera organo de la Asocio, kiu povas decidi en ĉiuj demandoj rilataj al la Asocio, kaj kiu konsistas el elektitaj delegitoj, reprezentantaj la membraron. La Ĝenerala kunveno estas sumo de la delegitoj de la individuaj membroj de la Asocio kaj reprezentantoj de la aligitaj membroj.

1.1.1. La mandato de la Ĝenerala kunveno validas por 4 jaroj.

1.1.2. La membroj de la Asocio, starantaj en senpera membreco kun la Asocio, kaj aliĝintaj al neniu aligita membro, aliĝinta societo, rajtas delegi po 1 personon por ĉiuj 20 kotizantaj membroj, sed povas sendi maksimume **9** 5 personojn en la Ĝeneralan kunvenon. Se malhelpata, la delegita reprezentanto ne anstataŭigeblas. La aligitaj membroj povas reprezentigi sin en la Ĝenerala kunveno pere de delegitoj kun nombro, difinita en Ĉapitro 3 p. 5.2.

1.1.3. La delegadon en la Ĝeneralan kunvenon okazigas la individuaj kaj aligitaj membroj kaj aliĝintaj societoj de la Asocio en siaj membrokunvenoj konforme al la Statuto kun atento al tio, ke ĉe la difino de membreco konsidereblas nur membroj:

- a) kiuj duonjaron antaŭ la delegado jam estis membroj de la Asocio;
- b) kiuj pagis senmanke sian kotizon, kaj
- c) ĉe aliĝinta societo estas plua kondiĉo, ke la aliĝinta societo plenumis sian devon anonci, registri la aligitan membron kaj kotizi por li, kaj la rilataj indikoj konstateblas, kontroleblas el la registro de la Asocio, kaj la kotizo estas pagita al la Asocio;
- d) se la membro, rajtigita je delegado, estas samtempe membro de alia(j) aligitaj grupoj, aligitaj societoj, ĉe la konstato de lia rajto delegi konsidereblas – konforme al lia deklaro – nur unufoje, t.e. li povas kandidati nur ĉe unu organizo. Se la membro malobservas ĉi tiun regulon, ĉiuj liaj kandidatigoj, delegadoj estas nevalidaj.

1.1.4. La delegadon anticipas kandidatigo. La kandidatigo estas valida, se la kandidato skribe konsentis ĝin. La delegado estas valida, se 20% de la delegrajtuloj ĉeestas la delegadon. La ĝeneral-kunvenan delegiton oni devas elekti surbaze de kandidatigo fare de almenaŭ 5% de la delegrajtuloj – per sekreta voĉdono.

1.1.5. El la kandidatoj delegeblas en la Ĝeneralan kunvenon de la Asocio, kiuj ĉe la voĉdono post la kandidatigo akiras la plej multajn voĉojn, ĝis la nombro de la delegitoj atingas la laŭstatutan nombron. Ne delegeblas, kiu ne akiras almenaŭ 10%-ojn de la voĉoj.

1.1.6. La Ĝeneralan kunvenon oni devas kunvoki almenaŭ unufoje ĉiujare kun la indiko de la loko, tempo kaj tagordaj punktoj. La invitilo oni devas sendi al la partoprenontoj skribe, en atestebla maniero almenaŭ 14 tagojn antaŭ la dato de la Ĝenerala kunveno. Pri tio zorgas la Estraro. En la invitilo oni devas indiki la tempon, en kiu oni devas okazigi la ripetitan Ĝeneralan kunvenon, se ne estas atingita la kvorumo en la Ĝenerala kunveno en la origina tempo. La ripetita Ĝenerala kunveno havas la kvorumon koncerne la tagordajn punktojn, indikitajn en la invitilo, senkonsidere al la nombro de la ĉeestantoj, se la membroj estas atentigitaj pri tio en la origina invitilo.

La invitilo devas enhavi

- a) la nomon kaj sidejon de la Asocio;
- b) indikon pri la tempo kaj loko de la kunsido;
- c) tagordon de la kunsido;
- d) la atentigon, ke la ripetita Ĝenerala kunveno havas la kvorumon koncerne la skribe komunikitajn tagordajn punktojn sendepende de la nombro de la aperintaj membroj. En la invitilo por la Ĝenerala kunveno povas esti indikita ankaŭ la tago de la ripetita Ĝenerala kunveno.

1.1.7. La eksterordinaran kunsidon devas kunvoki la Prezidanto, Ĝenerala vicprezidanto aŭ la Ekonomia vicprezidanto ene de 15 tagoj por dato en 30 tagoj.

1.1.8. Oni devas kunvoki la eksterordinaran Ĝeneralan kunvenon:

- a) se triono de la membroj skribe petas tion kun la indiko de la celo kaj kaŭzo;
- b) se la Estraro opinias necesa la kunvokon de eksterordinara Ĝenerala kunveno;
- c) se tribunalo ĝin ordonas.

1.1.9. Kunvoki la Ĝeneralan kunvenon estas la tasko de la Prezidanto.

1.1.10. La Ĝenerala kunveno havas la kvorumon, se pli ol duono de la voĉdonrajtaj membroj ĉeestas ĝin. Se iu membro aŭ fondinto ne povas voĉdoni en iu afero, ĉe alprenado de la koncerna decido li ignorendas dum la konstato de la kvorumo. Se pro manko de la kvorumo oni devas prokrasti la Ĝeneralan kunvenon, la ripetita Ĝenerala kunveno en dato ene de 30 tagoj havas la kvorumon kun senŝanĝa tagordo sendepende de nombro de la ĉeestantaj membroj.

1.1.11. La membroj aŭ fondintoj alprenas siajn decidojn en kunsido de decidofara organo per voĉdonado. Ĉe la alprenado de decidoj ne rajtas voĉdoni,

- a) kiun la decido liberigas de devo aŭ respondeco, aŭ havigas al li alispecajn avantaĝojn malutile al la jura persono;

- b) kun kiu, laŭ la decido, oni devas konkludi kontrakton;
- c) kontraŭ kiu, laŭ la decido, oni devas iniciati proceson;
- d) kies parenco, kiu ne estas membro aŭ fondinto de la Asocio, estas interesita en la decido;
- e) kiu estas en rilato, bazita sur plimulta influo, kun alia, en la decido interesita organizo; aŭ
- f) kiu cetere estas persone interesita en la decido.

La alprenon de decidoj ne rajtas partopreni persono, kiu, aŭ kies proksima parenco, vivkunulo (plue kune: parenco) estas liberigota, surbaze de la decido, de devo aŭ respondeco, aŭ havos iun ajn alian avantaĝon, aŭ estas alimaniere interesita en la konkludota jurafero. Ne konsideriĝas avantaĝo nemona servo, uzebla de iu ajn sen limigo en la kadro de la laŭcelaj havigoj de la Asocio, aŭ laŭcela havigo, donata, konforme al la fonda dokumento, de socia organizo al la propra membro.

1.1.12. La kunsidojn de la Ĝenerala kunveno prezidas la Prezidanto aŭ iu ajn Estrarano. La Prezidanto aŭ Estrarano povas konfidi la prezidadon de la Ĝenerala kunveno ankaŭ al iu alia. Pri la Ĝenerala kunveno oni faras protokolon, kiun aŭtentigas la prezidanto, la protokolanto kaj du, de la Ĝenerala kunveno elektitaj membroj. Pri la elekto de la ĝeneral-kunvenaj oficohavantoj, prezidanto, voĉnombrantoj decidas la membroj, ĉeestantaj en la Ĝenerala kunveno, per la plimulto de la voĉoj.

1.1.13. Al la ekskluziva kompetento de la Ĝenerala kunveno apartenas:

- a) deklaro de la fondo, malfondo de la Asocio, ĝia fuzio kun alia asocio, societo, organizo; decido pri ĝia aliĝo aŭ malaliĝo al alia enlanda aŭ internacia organizo;
- b) formulado, akcepto kaj modifo de la Statuto;
- c) elekto, eksigo, revoko de la Estraro;
- d) aprobo de la jarraporto;
- e) difino de la mezuro kaj sumo de la kotizo;
- f) elekto, eksigo, ekskludo, revoko de la membroj de la Revizia Komisiono;
- g) akcepto de la jarraporto de la Estraro, Prezidanto;
- h) pritrakto, akcepto de la financa raporto kaj bilanco;
- i) difino kaj akcepto de la jara buĝeto;
- j) aljuĝo, retiro de la distingaj titoloj Honora Prezidanto kaj Honora Membro de la Asocio;
- k) decido pri la plilongigo, mallongigo de la elekta ciklo;
- l) la Ĝenerala kunveno rajtas konfidi ĉiujn kompetentojn kaj taskojn al la Estraro, kies plenumo ne apartenas al ties taskoj kaj kompetentoj;
- m) decido pri ĉiuj demandoj, kiujn juraj normoj asignas en la kompetenton de la Ĝenerala kunveno;
- n) decido pri akcepto de aligita membro;
- o) kompilo de investa regularo.

1.1.14. La Ĝenerala kunveno alprenas siajn decidojn per simpla plimulto de la voĉoj. Ĉiu membro havas unu voĉon. La voĉdono estas malferma, sed sekreta pri personaj demandoj kaj demandoj, difinitaj de la Ĝenerala kunveno per plimultvoĉa decido. Pri la decidoj de la Ĝenerala kunveno la Estraro de la Asocio tenas registron, el kiu devas esti konstateblaj:

- a) enhavo de decido, rezolucio;
- b) tempo kaj loko de la alpreno de decido, valido de decido;
- c) proporcio de voĉoj ĉe la alpreno de decido (kontraŭaj, poraj, sindetenaj).

Post anticipa akordigo oni povas iam ajn enrigardi en la registron pri decidoj en la sidejo de la Asocio.

1.1.15. La decidojn, rezoluciojn de la Ĝenerala kunveno oni devas komuniki al la membroj skribe, en atestebla maniero. Plue, la Asocio publikigas siajn decidojn, rezoluciojn kaj raportojn per poŝto aŭ e-poŝto, en la retejo de la Asocio aŭ pere de novaĵletero de la Asocio.

1.1.16. Estas bezonata la du-triona plimulto de la voĉoj de la ĉeestantaj membroj en la Ĝenerala kunveno:

- a) por elekti, eksigi estraranojn;
- b) por eksigi, ekskludi membron, komisionanon;
- c) por akcepti la jarraporton de la Prezidanto kaj Estraro;
- d) por difini kaj akcepti la jaran buĝeton;

- e) por decidi pri la plilongigo, mallongigo de la elekta ciklo;
- f) por decidi pri fermita Ĝenerala kunveno.

1.1.17. Estas bezonata la tri-kvarona plimulto de la voĉoj de la ĉeestantaj membroj de la Ĝenerala kunveno:

– por modifi la Statuton de la Asocio.

1.1.18. Estas bezonata la tri-kvarona plimulto de la voĉoj de la voĉdonrajtaj membroj:

– por modifi la celojn de la Asocio kaj por decidi en la Ĝenerala kunveno pri la malfondo de la Asocio.

1.1.19. La kunsidoj de la Ĝenerala kunveno estas malfermaj. Partoprenantoj, kiuj ne estas membroj de la Ĝenerala kunveno, havas interkonsiliĝan sed ne voĉdonan rajton en la Ĝenerala kunveno. La elektitaj membroj de la Ĝenerala kunveno povas ordoni ferman kunsidon per plimultvoĉa decido, se la protekto de personecaj rajtoj ĝin necesigas.

1.1.20. La Prezidanto rajtas inviti, kun interkonsiliĝa rajto, reprezentantojn de ŝtataj, sociaj, ekonomiaj organizoj aŭ privatajn personojn, kiuj helpas la Asocion atingi siajn celojn, aŭ disponas konojn, kiuj povas kontribui al la solvo de rilataj taskoj.

1.2. La mandato de la Ĝenerala kunveno ĉesas:

- a) kun la finiĝo de la mandato;
- b) se ĝi eksigas sin;
- c) se la Asocio malfondiĝas;
- d) kun revoko.

1.2.1. Por vakiĝinta ĝeneral-kunvena loko delegas novan delegiton por la laŭvica Ĝenerala kunveno la grupo, kie la vakiĝo okazis.

1.2.2. La Ĝenerala kunveno povas eksigi sin, se

- a) ĝi ne kapablas plenumi – ĉu proprakulpe, ĉu sen propra kulpo – siajn taskojn dum duona jaro;
- b) inter la membroj de la Ĝenerala kunveno estiĝas tia nesolvebla kontraŭeco, kiu influas malavantaĝe ĝian funkciadon, la efikan plenumadon de ĝiaj taskoj kaj influas ĝin kontraŭ la celoj de la Asocio;
- c) ĝia funkciado malebliĝas.

1.2.3. La Ĝeneralan kunvenon povas revoki, per du-triona voĉplimulto, la plenrajtaj, registritaj kaj regule kotizantaj, por la koncerna jaro kotizintaj membroj de la Asocio.

1.2.4. Se la mandato de la Ĝenerala kunveno ĉesas per revoko, kaj sekve oni devas formi novan Ĝeneralan kunvenon, ne povas esti membroj de la nova Ĝenerala kunveno tiuj, kiuj estis delegitaj en la pli fruan Ĝeneralan kunvenon.

1.2.5. La revokon povas iniciati ankaŭ la Estraro de la Asocio kun la indiko de la kaŭzo.

2. Estraro

2.1. La Estraro praktikas la kompetenton de la Ĝenerala kunveno dum la periodo inter du Ĝeneralaj kunvenoj – escepte la ekskluzivajn kompetentojn –, direktas la funkciadon de la Asocio. Tasko de la Estraro estas direkti la laboron de la Asocio, ĝi rajtas decidi pri ĉiuj demandoj, kiujn la Statuto ne asignas en la ekskluzivan kompetenton de alia organo de la Asocio, kaj kiu ne malobservas la organizan memstarecon de la unuopaj organizaj unuoj, aliĝintaj societoj.

2.2. La kunsidojn de la Estraro oni devas kunvoki skribe, en atestebla maniero. La Estraro alprenas siajn decidojn per la plimultaj voĉoj de la ĉeestantaj membroj. La Estraro havas la kvorumon, se la kunsidon ĉeestas almenaŭ 3 estraranoj. Ĉe manko de kvorumo oni devas kunvoki la Estraron skribe, en atestebla maniero plej malfrue por dato en 30 tagoj. Pro manko de kvorumo refoje kunvokita kunsido havas nur tiam la kvorumon, se ĝin ĉeestas almenaŭ tri estraranoj. Kun konsidero al la temaro, al la kunsidoj de la Estraro oni povas laŭokaze inviti pliajn asociajn membrojn, kiuj disponas informojn kaj povas kontribui al la pritrakto de la temaro, ne havante voĉdonan, nur interkonsiliĝan rajton.

2.3. La 5-membran Estraron elektas la Ĝenerala kunveno por oficperiodo de 4 jaroj el la membroj de la Asocio. La kandidatigo kaj elekto okazas laŭ oficoj. Kiel elektita konsiderendas la persono, kiu ricevis laŭ la rangovico de la kandidatoj la plej multajn voĉojn, ĝis la nombro de la estraranoj atingas 5 personojn. Ne povas esti estrarano, kiu ne ricevas almenaŭ 15%-ojn de la validaj voĉoj (senrezulta balottrondo). En tia okazo oni devas fari novan elekton. En la sekva balottrondo oni voĉdonas pri la samaj kandidatoj, kiel en la unua. En la dua balottrondo validas por la elekto la reguloj de la unua balottrondo kun tio, ke la duan rondon povas partopreni nur la 10 plej multajn voĉojn ricevintaj kandidatoj. En la dua balottrondo oni devas konsideri elektita estrarano tiun kandidaton, kiu ricevis la plej multajn validajn voĉojn.

2.4. Estrarano povas esti nur agokapabla, plenaĝa persono kun senpuna antaŭa vivo. La kandidato devas skribe deklari la ekziston de la kondiĉoj kaj tion, ke kontraŭ li ne ekzistas ekskluda kaŭzo.

Postuloj al kaj ekskludaj kaŭzoj kontraŭ la estraranoj

Gvida oficohavanto povas esti nur plenaĝa persono, kies agokapablo ne estas limigita en la sfero, necesa por la plenumo de la agado.

Se la gvida oficohavanto estas jura persono, la jura persono devas nomi naturan personon, kiu plenumas, en ĝia nomo, la taskojn de gvida oficohavanto. La reguloj, validaj pri la gvidaj oficohavantoj, aplikendas ankaŭ pri la nomita persono.

La gvida oficohavanto devas plenumi persone siajn afergvidajn taskojn.

Ne povas esti gvida oficohavanto, kiu estas jurvalide kondamnita al malliberigo pro krimo, ĝis li seniĝos je la malavantaĝaj sekvoj, rilataj al la punhavaj antecedentoj.

Ne povas esti gvida oficohavanto, al kiu estas jurvalide malpermesita tia okupo. Al kiu estas jurvalide malpermesita iu okupo fare de tribunala verdikto, tiu ne povas esti, por la validado de la malpermeso, gvida oficohavanto por la jura persono, kiu plenumas la agadon, nomitan en la verdikto.

Ne povas esti gvida oficohavanto dum la tempodaŭro, donita en la decido pri malpermeso, al kiu estas malpermesita agado kiel gvida oficohavanto.

2.5. La Estraro kunsidas laŭnecese, sed ĉiujare almenaŭ kvarfoje.

2.6. La Estraron kunvokas skribe la Prezidanto. Regulkonforma konsidereblas la kunvoko, se la membroj estas skribe informitaj pri la kunsido almenaŭ ok tagojn antaŭ la dato de la kunsido pere de poŝto aŭ e-poŝto kaj ricevas priskribon pri la temaro de la kunsido. En urĝa, eksterordinara okazo kaj en okazo, postulanta neprokrasteblan dispozicion, la Prezidanto povas doni ankaŭ pli mallongan limdaton kaj kunvoki la kunsidon de la Estraro, kun indiko de la kaŭzo, ankaŭ alimaniere (fakse, telefone, per persona renkontiĝo ktp).

2.7. La kunsidoj de la Estraro estas publikaj. Personoj kun invitilo, eldonita de la Prezidanto aŭ la Estraro, povas partopreni la estraran kunsidon kun interkonsiliĝa rajto, sen havi tamen balotrajton. Manke de invitilo la Estraro pritraktas antaŭ la tagordo la permeson de partopreno kaj decidas pri ĝi per la plimulto de la voĉoj. Per sia decido de du-triona voĉplimulto la Estraro povas ekskludi la publikecon, se la protekto de personecaj rajtoj tion necesigas.

2.8. La Estraro devas teni registron pri siaj decidoj. El la registro devas esti konstateblaj la enhavo, tempo, validado de la decido kaj la nombra proporcio de la poruloj kaj kontraŭuloj de la decido. La Estraro devas skribe komuniki sian decidon ene de 5 tagoj al la koncerna(j) persono(j). La Estraro devas publikigi la decidojn en la retejo de la Asocio. La registro pri la decidoj devas esti iam ajn rigardebla, post anticipa akordigo, en la sidejo de la Asocio.

2.9. La alprenon de decido ne rajtas partopreni persono, kontraŭ kiu validas ekskludaj kaŭzoj, listigitaj en la Leĝo de la jaro 2011 n-ro CLXXV pri la unuiĝa juro, publikutila statuso, funkciado kaj subtenado de civilaj organizoj.

2.10. La kunsidojn de la Estraro rajtas partopreni sen aparta invitilo la hungaria reprezentanto de EEU, la ĉefdelegito de UEA, la honoraj prezidantoj, la jura konsilisto kaj respondeculo pri instruado de la

Asocio kiel konstantaj invititoj. La Estraro anticipe informas perbuŝe la ĉi-punkte nomitajn personojn pri la laŭvica kunsido de la Estraro.

2.11. La Estraro rajtas suspendi la funkciadon de iu ajn organiza unuo, ĉesigi la kunlaboron kun aliĝinta organizo, se ĝi funkcias malkonforme al jura normo, la Statuto aŭ ĝeneral-kunvena decido, celoj kaj interesoj de la Asocio. Antaŭ la alprenado de decido oni devas peti la opinion de laborgrupo, starigita de la Estraro. La kunsidon de la Estraro povas prezidi la Prezidanto aŭ iu ajn Vicprezidanto.

2.12. La taskaro kaj kompetento de la Estraro:

- a) prepara laboro por formuli, modifi la Statuton;
- b) formulado, akcepto, modifo de la Regularo pri organizo kaj funkciado;
- c) procedoj, rilataj al la estiĝo kaj ĉeso de membreco, ekskludoj; alprenado de rilataj decidoj;
- d) prepara agado, rilata al la kunvoko, funkciado de la Ĝenerala kunveno kaj organiza agado, kontribuanta al la laboro de la Ĝenerala kunveno; iniciato de la revoko de la Ĝenerala kunveno;
- e) preparo de la jaraj laborplano kaj buĝeto;
- f) decidoprepara laboro, rilata al la ekonomia agado de la Asocio, diskuto kaj akcepto de la jaraj programoj kaj buĝeto;
- g) plenumo de la reprezentado de la Asocio;
- h) alprenado de decido pri aljuĝo de la memormedalo Pro Esperanto kaj Distinga Insigno de HEA, transdono de memordiplomoj;
- i) propono pri aljuĝo de la distingaj titoloj Honora Prezidanto kaj Honora Membro;
- j) propono pri komisionanoj, oficohavantoj, elekteblaj de la Ĝenerala kunveno;
- k) akcepto de la jarraporto de la Prezidanto;
- l) preparo de la jarraporto;
- m) konkludo de kunlaboraj kontraktoj por aligi grupojn;
- n) propono al la Ĝenerala kunveno por difini la jarkotizon;
- o) raportigo de oficohavantoj;
- p) pretigo de la jaraj financa raporto kaj bilanco;
- q) difino de la financa subteno de la unuopaj organizaj unuoj;
- r) procedo, rilata al ekskludo de membro de la Asocio;
- s) iniciato de disciplino, krimjura kaj civiljura respondeciga procedo;
- t) reviziado de la kontadaj reguloj kaj monmastrumado;
- u) ĉiu procedo, kiu ne apartenas al la ekskluziva kompetento de la Ĝenerala kunveno, kaj kiujn la Estraro prenas en sian kompetenton.

2.1.3. La mandato de la Estraro ĉesas:

- a) kun la finiĝo de la mandato;
- b) kun la malfondo de la Asocio;
- c) kun la eksigo de la Estraro;
- d) kun la demisio de la Estraro.

2.1.4. Por vakiĝinta estrara loko elekteblas nova estrarano en la laŭvica aŭ eksterordinara Ĝenerala kunveno laŭ la reguloj pri la elekto de estraranoj.

2.1.5. Por eksigo kaj demisio de la Estraro aplikendas respektive la reguloj pri la eksigo (Ĉapitro 5 p. 3.1.8, 3.1.9.) kaj demisio (Ĉapitro 5 p. 3.16, 3.1.7.) de la Prezidanto.

3. Oficohavantoj de la Asocio

3.1. Prezidanto de la Asocio

3.1.1. La Prezidanton de la Asocio elektas la Estraro mem el siaj membroj por periodo de 4 jaroj, li estas respondeca por sia agado al la Ĝenerala kunveno.

3.1.2. La Prezidanto reprezentas la Asocion en la enlandaj kaj internaciaj kontaktoj de la Asocio.

3.1.3. La taskaro kaj kompetento de la Prezidanto:

- a) li direktas la agadon de la Asocio;
- b) li kunvokas la Ĝeneralan kunvenon, parafas ties decidojn;
- c) li decidas kaj faras dispoziciojn en periodoj inter la kunsidoj de la Estraro en demandoj, apartenantaj al la kompetento de la Estraro, pri kio li devas raporti en la sekva estrara kunsido;
- d) li direktas kaj kontrolas la efektivigon de la decidoj kaj starpunktoj, alprenitaj de la Ĝenerala kunveno kaj Estraro;
- e) li tenas kontaktojn kun aliaj sociaj kaj korporaciaj organizoj;
- f) li kunvokas la Ĝeneralan kunvenon kaj la kunsidojn de la Estraro;
- g) li raportas pri sia agado al la Estraro;
- h) li rajtas konfidi al iu ajn estrarano la plenumon de taskoj, apartenantaj al lia kompetento;
- i) li direktas la laboron de la Estraro;
- j) li faras dispoziciojn kaj decidas en aferoj, asignitaj al lia kompetento;
- k) li direktas la mastrumadon de la Asocio;
- l) li praktikas memstare asignan rajton;
- m) li kontrolas la mon-, kontoperaciojn, la kontomovojn, superrigardas la ekonomiajn, financajn dispoziciojn de la Ekonomia vicprezidanto;
- n) li zorgas pri la kompilo de la jarraporto;
- o) li plenumas ĉiujn taskojn, kiujn jura normo asignas en la kompetenton de la Prezidanto.

3.1.4. La mandato de la Prezidanto ĉesas:

- a) kun lia morto;
- b) kun finiĝo de lia mandato;
- c) kun malfondo de la Asocio;
- d) kun eksmembriĝo de la Prezidanto en la Asocio;
- e) kun demisio de la Prezidanto;
- f) kun eksigo de la Prezidanto;
- g) kun konstato de intereskonflikto;
- h) kun ekskludo de la Prezidanto el la Asocio.

3.1.5. Por eksmembriĝo kaj ekskludo aplikendas respektive la reguloj en Ĉapitro 3, pp. 4.1, 4.2 kaj 4.3.

3.1.6. La Prezidanto povas iam ajn demisii, se li ne plu scipovas plenumi sian taskon. La demisia tempodaŭro estas 3 monatoj. La intencon de demisio la Prezidanto devas komuniki skribe al la Ĝenerala kunveno, kaj ĝi ekvalidos kun la decido de la Ĝenerala kunveno pri ties akcepto. La Ĝenerala kunveno povas konsenti pli mallongan demisian tempodaŭron ol 3 monatoj. Kun retroaktiva forto ne eblas valide demisii. Ĝis la elekto de la nova Prezidanto la demisiinta Prezidanto devas gvidi aferojn, bezonantajn senprokrastajn dispoziciojn ĝis kontraŭa ordono de la Ĝenerala kunveno kaj informi pri tio la Estraron.

3.1.7. La demisiinta Prezidanto ne rajtas praktiki sian asignan rajton super la sumo, difinita en la Regularo, pri personaj demandoj lia voĉdona rajto estas limigita en grado laŭ la Regularo, en internaciaj rilatoj li ne rajtas reprezenti la Asocion.

3.1.8. Pri la eksigo de la Prezidanto decidas la Ĝenerala kunveno kun du-triona rezolucio. Oni povas eksigi la Prezidanton, se

- a) li ne scipovas plenumi sian taskon tra 2 monatoj ĉu proprakulpe, ĉu sen propra kulpo;
- b) se li fariĝas daŭre nekapabla plenumi sian taskon;
- c) se li intence preterlasas sian taskon, aŭ intence komunikas, nekonforme al la vero, esencajn datumojn, faktojn, informojn, aŭ prisilentas ilin;
- d) se li kondutas kontraŭe al la Statuto kaj celoj de la Asocio, aŭ pro perdo de konfido li fariĝas alimaniere neinda por sia ofico;
- e) se al li estas jurvalide malpermesite praktiki publikajn aferojn, aŭ li estas sub efiko de krimkaj/aŭ deliktoafera procedo;
- f) se en etika aŭ disciplina procedo kontraŭ li oni proponis lian eksigon;
- g) se la kunlaboro de la Estraro kun li malebliĝis, aŭ alimaniere la Estraro perdis sian konfidon al li en grado, kiu jam endanĝerigas ĝian funkciadon.

3.1.9. Oni devas eksigi la Prezidanton, se dum duonjaro li ne partoprenas la laboron de la Asocio.

3.1.10. Se kreiĝas intereskonflikto koncerne la personon de la Prezidanto, li devas ĉesigi ĝin. Se li ne obeas en 30 tagoj post la alvoko fare de la Ĝenerala kunveno, la Ĝenerala kunveno konstatas en decido, ke la mandato de la Prezidanto ĉesis.

3.1.11. Konsideriĝas intereskonflikto, se la Prezidanto agadas kiel oficohavanto en alia organizo, simila al la Asocio, aŭ prisilentas ties fakton, aŭ se la celoj de la alia organizo estas kontraŭaj al tiuj de la Asocio, aŭ se li uzas la Asocion por atingo de siaj celoj aŭ tiuj de alia organizo. La Prezidanto devas senprokraste anonci la intereskonflikton al la Ĝenerala kunveno. Kun rigardo al la celoj de la Asocio, la Ĝenerala kunveno rajtas liberigi la Prezidanton de la ĉesigo de la intereskonflikto.

Oni ne povas elekti en la gvidorganojn de HEA, ĝiajn landajn korporaciojn aŭ Komisionon personojn, kiuj havas decidan influon aŭ gvidajn poziciojn en merkate konkurencaj organizoj, plenumantaj agadojn samajn kun la baza agado de HEA.

3.1.12. Por la vakiĝinta loko de la Prezidanto elektendas ene de 2 monatoj nova Prezidanto el la estraranoj.

3.1.13. La Prezidanto reprezentas memstare la Ĝeneralan kunvenon.

3.2. Ĝenerala vicprezidanto de la Asocio

3.2.1. Ĉe foresto kaj malhelpado de la Prezidanto lin anstataŭas la Ĝenerala vicprezidanto kaj la Ekonomia vicprezidanto kune. Ĉe anstataŭado la Ĝenerala vicprezidanto kaj la Ekonomia vicprezidanto reprezentas kune, kun plena rajtigo, la Asocion kaj praktikas la rajtojn de la Prezidanto.

3.2.2. Taskaro kaj kompetento de la Ĝenerala vicprezidanto:

- a) la Ĝenerala vicprezidanto helpas la Prezidanton en ties laboro per sia prepara, propona agado;
- b) li organizas la preparon, kompilon kaj efektivigon de la decidoj de la Ĝenerala kunveno kaj Estraro;
- c) tutlande li plenumas la organizan laboron;
- d) surbaze de rajtigo fare de la Prezidanto kaj Estraro li reprezentas, kune kun la Ekonomia vicprezidanto, la Asocion;
- e) por popularigi la lingvon Esperanto li organizas la agadon, komunajn programojn de la Asocio kaj aliaj organizoj, kaj informas pri tio la membrojn de la Asocio;
- f) li antaŭenigas la glatan kunlaboron de la Asocio kaj organizoj de la Asocio kun aliaj organizoj;
- g) li organizas la propran laboron, direktas, regule kvalifikas la operacian laboron;
- h) li faras proponojn por plibonigo de la efikeco, certigo de la sukceso kaj evoluigo de la asocia laboro.

3.2.3. La Prezidanto povas transdoni al la Ĝenerala vicprezidanto taskojn, kompetentojn, kiujn la Statuto, Regularo ne asignas en la ekskluzivajn taskaron kaj kompetenton de la Prezidanto.

3.2.4. Por la enoficigo kaj eksigo de la Ĝenerala vicprezidanto oni devas apliki la regulojn pri la Prezidanto.

3.3. Ekonomia vicprezidanto de la Asocio

3.3.1. La Ekonomia vicprezidanto estas la plej alta operacia direktanto de la Asocio. En lia foresto kaj malhelpado la Prezidanton anstataŭas la Ĝenerala vicprezidanto kaj la Ekonomia vicprezidanto kune. Ĉe anstataŭado la Ĝenerala vicprezidanto kaj la Ekonomia vicprezidanto kune plenrajte reprezentas la Asocion kaj praktikas la rajtojn de la Prezidanto.

3.3.2. Taskaro kaj kompetento de la Ekonomia vicprezidanto:

- a) ĉe asignado fare de la Prezidanto li plenumas pagojn;
- b) ĉe elspezoj en la kadro de la buĝeto li havas asignan rajton laŭ la Regularo;
- c) kune kun la Ĝenerala vicprezidanto li reprezentas la Asocion;
- d) li plenumas la kvitancadajn, registradajn taskojn, ties kontrolon laŭ formala, enhava, kontada vidpunktoj, kontrolas ties plenumon;

- e) li certigas la gardadon de dokumentoj kun rigora kvitancado, ordon de ilia traktado kaj kontrolas ties plenumon;
- f) li faras dispoziciojn, por likvidi la mankojn, malkovritajn de eksteraj kaj internaj revizioj kaj tiujn trovitajn en lia agadsfero;
- g) li kompilas la regularojn por sia laborsfero, igas anticipe prijuĝi ilin de la Estraro;
- h) li faras proponojn, plibonigantajn, evoluigantajn la efikecon, sukceson de la asocia laboro;
- i) li zorgas pri tio, ke la Asocio mastrumu laŭ la validaj kontadaj kaj ceteraj juraj normoj;
- j) li kontrolas kaj prizorgas la observon de la fakturadaj kaj kvitacadaj devoj, la preparon kaj observon de la devige formulenda kontada politiko kaj kontraktadaj regularoj;
- k) li devas teni kontinuan registron pri la ekonomiaj okazaĵoj, trakti la kason laŭ la juraj normoj;
- l) li zorgas pri la transpreno, registrado, sekura gardado, valorkonservo, pliriĉigo de la havataj valoraĵoj, rimedoj, eldonaĵoj de la Asocio.

3.3.3. Por la enoficigo kaj eksigo de la Ekonomia vicprezidanto aplikendas la reguloj pri la Prezidanto.

3.4. Komunaj reguloj pri la oficohavantoj, komisionanoj

3.4.1. La komunaj reguloj pri la oficohavantoj aplikendas, se la Statuto ne ordonas diference.

3.4.2. Kiel oficohavanto elekteblas ekskluzive membro de la Asocio.

3.4.3. La elekto de la oficohavantoj (Prezidanto, Ĝenerala vicprezidanto, Ekonomia vicprezidanto) apartenas al la kompetento de la Estraro, la elekto okazas per sekreta baloto. Elektita konsiderendas la persono, kiu akiris du trionojn de la validaj voĉoj. Se neniu el la kandidatoj ricevas la du trionojn de la validaj voĉoj, oni devas fari novan baloton pri la du personoj, ricevintaj la plej multajn voĉojn. La venkinto de la ripetita baloto estas la persono, ricevinta pli multajn voĉojn.

3.4.4. Postuloj al oficohavantoj kaj ekskludaj kaŭzoj

Gvida oficohavanto povas esti plenaĝa persono, kies agokapablo ne estas limigita en la sfero, necesa por lia agado.

Se la gvida oficohavanto estas jura persono, la jura persono devas nomi naturan personon, kiu plenumas en ĝia nomo la taskojn de gvida oficohavanto. La reguloj pri la gvidaj oficohavantoj aplikendas ankaŭ pri la nomita persono.

La gvida oficohavanto devas plenumi siajn afergvidajn taskojn persone.

Ne povas esti gvida oficohavanto, kiu pro perpetuo de krimo estas jurvalide kondamnita al malliberiga puno, ĝis li liberiĝos de la malavantaĝaj sekvoj de la punhava antaŭa vivo.

Ne povas esti gvida oficohavanto, al kiu estas jurvalide malpermesita ĉi tiu okupo. Al kiu estas malpermesita per jurvalida verdikto ia okupo, sub la efiko de la malpermeso li ne povas esti gvida oficohavanto de jura persono, plenuminta en la verdikto nomitan agadon.

Dum la tempodaŭro, donita en la decido pri la malpermeso ne povas esti gvida oficohavanto tiu, al kiu estas malpermesite funkcii kiel gvida oficohavanto.

3.4.5. La mandato de la oficohavanto ĉesas:

- a) kun lia morto;
- b) kun finiĝo de lia mandato;
- c) kun malfondo de la Asocio;
- d) kun eksmembriĝo de la oficohavanto en la Asocio;
- e) kun demisio de la oficohavanto;
- f) kun eksigo de la oficohavanto;
- g) kun konstato de intereskonflikto;
- h) kun ekskludo de la oficohavanto el la Asocio.

3.4.6. Por eksmembriĝo kaj ekskludo aplikendas respektive la reguloj de Ĉapitro 3, pp. 4.1, 4.2 kaj 4.3.

3.4.7. La oficohavanto povas demisii, se li ne plu scipovas plenumi sian taskon. La demisia tempodaŭro estas 2 monatoj. La intencon demisii la oficohavanto devas skribe komuniki al la Estraro, kaj ĝi ekvalidos kun la decido de la Ĝenerala kunveno pri ties akcepto. La Ĝenerala kunveno povas konsenti pli mallongan demisian tempodaŭron ol 2 monatoj. Kun retroaktiva forto ne eblas valide demisii. Ĝis la elekto de la nova oficohavanto la demisiinta oficohavanto devas gvidi aferojn, bezonantajn senprokrastajn dispoziciojn ĝis kontraŭa ordono de la Ĝenerala kunveno kaj informi pri tio la Estraron.

3.4.8. Por la eksigo de la oficohavanto aplikendas la reguloj de Ĉapitro 5 p. 3.18, por intereskonflikto la reguloj de Ĉapitro 5 pp. 3.1.10, 3.1.11.

3.4.9. Oni devas eksigi la oficohavanton, se dum ses monatoj li ne partoprenas la laboron de la Asocio.

3.4.10. Por vakiĝinta ofico de oficohavanto oni devas elekti novan oficohavanton en la laŭvica Ĝenerala kunveno, estrara kunsido.

3.4.11. Ne povas esti oficohavanto de la Asocio, membro, prezidanto de la Revizia Komisiono, persono, kontraŭ kiu estas iniciatita krim- kaj/aŭ deliktojura procedo, aŭ al kiu estas jurvalide malpermesite praktiki publikajn aferojn.

4. Revizia Komisiono

4.1. La Revizia Komisiono estas la kontrolorgano de la Asocio. La nomliston, oficon, mandattempon, dokumenton pri ŝtataneco de la membroj de la Revizia Komisiono oni devas teni fermitaj en la sidejo de la Asocio.

4.2. La Revizia Komisiono kunsidas laŭnecese, sed ĉiujare almenaŭ unufoje. Ĝi alprenas siajn decidojn per la plimultaj voĉoj de la ĉeestantaj membroj pere de malferma voĉdono (manlevo). Komisionano, kiu ne konsentas pri la decido, povas aneksi en fermita koverto apartan opinion al la decido, kiun nur la Estraro rajtas malfermi. La Revizia Komisiono havas la kvorumon, se en la kunsido ĉeestas almenaŭ 2 komisionanoj. Ĉe manko de la kvorumo oni devas refoje kunvoki la Komisionon plej malfrue ene de 30 tagoj. La pro manko de la kvorumo refoje kunvokita kunsido havas la kvorumon, se ĝin ĉeestas almenaŭ du komisionanoj. Al la kunsidoj de la Komisiono oni povas okaze inviti, kun konsidero de ĝia temaro, pluajn informhavajn membrojn de la Asocio, scipovantajn helpi ĉe la pritrakto de la temaro, kiuj tamen ne havas voĉdonon, nur ekskluzive interkonsiliĝan rajton.

4.3. La 3-membran Revizian Komisionon elektas la Ĝenerala kunveno per sekreta voĉdono por 4 jaroj el la ordinaraj membroj de la Asocio. Por la elekto de la membroj kaj prezidanto de la Komisiono aplikendas laŭsence la reguloj pri la elekto de la estraranoj.

4.4. Por intereskonflikto ĉe la membroj de la Revizia Komisiono aplikendas la intereskonfliktaj reguloj, rilataj al la estraranoj kun la kompletigo, ke ne povas esti membro de la Revizia Komisiono tiu, kontraŭ kiu validas ekskludaj kaŭzoj laŭ la Leĝo de la jaro 2011 n-ro CLXXV pri la funkciado kaj subtenado de civilaj organizoj. Membro de la Revizia Komisiono povas esti plenaĝa persono, kies agokapablo ne estas limigita en la por lia agado necesa sfero. Ne povas esti membro de la Revizia Komisiono, kontraŭ kiu validas ekskluda kaŭzo rilata al gvidaj oficohavantoj, plue kiu aŭ kies parenco estas gvida oficohavanto de la Asocio.

4.5. Taskoj de la Revizia Komisiono:

- a) kontrolo de la funkciado de la Asocio laŭ juraj normoj, Statuto kaj Regularo;
- b) kontrolo de la havaĵ- kaj kontraktado, mastrumado de la Asocio;
- c) kontrolado de la plenumo kaj bilanco de la buĝeto;
- d) kunlaboro kun aliaj komisionoj, organoj por la sukcesa plenumo de la taskoj;
- e) kontrolo de la afergvidado de la Asocio;
- f) efektivigo de okazaj revizioj surbaze de la rajtigo de la Ĝenerala kunveno kaj Estraro;
- g) ĉe suspekto de malobservo de jura normo, mastrumado kontraŭa al la Statuto, Regularo, asocia decido – iniciatado de ekspertiza ekzameno kaj konstato de la respondeco, pri kies rezulto kaj lanĉo de la procedo la Revizia Komisiono devas informi la Estraron kaj Ĝeneralan kunvenon.

4.6. La Komisiono elektas la Prezidanton de la Komisiono el siaj membroj.

4.7. Membro de la Komisiono ne povas havi alian oficon en alia organo de la Asocio, escepte se tio estas grava intereso de la Asocio, kaj estiĝas faka motivo, kiu tion necesigas. Liberigon povas doni la Ĝenerala kunveno.

4.8. La Komisiono alprenas siajn decidojn per simpla plimulto de la voĉoj. Ĉe voĉegaleco la decidon oni devas konsideri neakceptita.

4.9. La Komisiono informas skribe la Estraron pri siaj konstatoj kaj raportas al la Ĝenerala kunveno.

4.10. La Komisiono difinas mem sian proceduron. La komisionanoj havas egalajn rajtojn kaj ŝarĝas ilin egalaj devoj.

4.11. La laboron de la Komisiono devas subteni ĉiu membro, organo de la Asocio, ili devas doni la necesajn informojn, transdoni dokumentojn, fakturojn, datumojn (por enrigardo aŭ en kopio).

4.12. La Komisiono rajtas enrigardi en dokumentojn, koncernajn la Asocion, ekzameni datumojn, registrojn.

4.13. Membro de la Komisiono rajtas partopreni la kunsidojn de la Ĝenerala kunveno kun interkonsiliĝa rajto; ĉe malobservo de jura normo, kulpo kontraŭ la Statuto, Regularo, ĉe grava preterlaso informi senprokraste la Estraron, iniciati ties kunvokon ĉe la Prezidanto.

4.14. La kunsidoj de la Komisiono estas fermitaj, pri ili oni devas fari protokolon. En kazo de neceso, kun rigardo al la naturo de la afero, la Komisiono povas inviti aliajn personojn, por antaŭenigi la malkovron de faktoj. La Komisiono povas okaze enigi en la laboron ankaŭ aliajn membrojn de la Asocio.

5. Komunaj reguloj por la Ĝenerala kunveno kaj la elektitaj organoj de la Asocio

5.1. Ĉiun elektitan organon kaj oficohavanton oni devas elekti post kandidatigo fare de almenaŭ 1% de la voĉdonrajtuloj per sekreta baloto.

5.2. La renovigo de la komisionoj kaj oficohavantoj okazas ĉiun 4an jaron, sed la Ĝenerala kunveno povas difini per kvalifikita plimulto de la voĉoj pli mallongan oficperiodon.

5.3. Kiun ajn elektitan oficohavanton, estraron, komisionanon kaj la Estraron kaj iun ajn delegiton de la Ĝenerala kunveno oni povas revoki, se

a) li preterlasas kotizi dum tri monatoj;

b) kiu proprakulpe malhelpas la efektivigon de Ĉapitro 1 kaj de la celoj de la Ĝenerala kunveno per sia konduto kontraŭa al la ideoj de la Asocio, tenas sin ne laŭetike al la Ĝenerala kunveno, al iu ajn ĝia membro, organo, oficohavanto;

c) kiu aliĝis al la Asocio kun nepermesita celo kontraŭa al la Statuto de la Asocio, por fari kaŝitan agadon

d) kiu uzas la celojn, organizon, membraron de la Asocio, la Asocion mem kaj ties idean fonon por celo, kontraŭa al la interesoj de la Asocio;

e) kun kiu la plua kunlaboro tiom malebliĝas pro personaj aŭ iu ajn alia kaŭzo, ke tio endanĝerigas la celojn de la Asocio, la laboron de ties organizo.

5.4. Revokon povas iniciati 2/3 de la membroj de la elektinta korporacio aŭ la Estraro de la Asocio, kaj decidis pri ĝi 2/3 de la Ĝenerala kunveno.

5.5. La elektaj organoj alprenas siajn decidojn per simpla plimulto kun escepto de la kazoj, pri kiuj la Statuto aŭ la Regularo preskribas kvalifikitan aŭ du-trionan plimulton de la voĉoj. La kvalifikita plimulto signifas la plimulton de la voĉoj de la plena nombro de la korporacio.

5.6. Kontraŭ decido de elektita organo oni povas turni sin kun skriba plendo al la elekta korporacio ene de 30 tagoj post la enmanigo aŭ publikigo de la decido, kaj se la decido pli malfrue sciiĝas al la koncernato, ene de 30 tagoj post la sciiĝo. Se la elekta korporacio ne ekzamenas efektive la aferon, aŭ kontraŭ ties decido oni povas turni sin al la Estraro kun plendo ene de 8 tagoj. La apelacio havas prokrastan efikon.

5.7. Ĉe la organizaj unuoj, kie signifa parto de la membroj agadas aŭ vivas ne en la sama loĝloko, la elekto povas okazi pere de letero aŭ e-poŝto.

Ĉapitro 6

Lingvoinstrua agado de la Asocio

1. Personoj, rekomenditaj de la Estraro de la Asocio rajtas kun ties kunlaboro kaj organizado fari lingvoinstruan agadon en la nomo de Hungaria Esperanto-Asocio kaj kun rekomendo de la Asocio; ĉi tiuj personoj rajtas uzi en siaj ofertoj la nomon kaj aspektajn elementojn de Hungaria Esperanto-Asocio.
2. La Asocio rajtas elpaŝi kontraŭ ĉiu, en la nomo de HEA efektivigata kaj la bonan famon de la Asocio miskreditiganta lingvoinstrua agado – ankaŭ per iniciato de procedo antaŭ konvena faka forumo –, kontraŭ kiu venas plendo al la Asocio, al iu ajn ĝia organo – aŭ lige kun tio – de iu ajn lingvoinstrua, lingvoekzamena organizo ĉu pro la nivelo de la instruado, ĉu pro la lingvoinstrua persono, ĉu pro la objektaj aŭ personaj kondiĉoj.

Ĉapitro 7

Internaciaj kontaktoj de la Asocio

La Asocio funkcias en sia internacia agado kiel kolektiva membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kunlaboranta kun UNESKO.

2. La prizorgo de la internaciaj kontaktoj de la Asocio apartenas al la kompetento de la Prezidanto kaj la Ĝenerala vicprezidanto.
3. La komitatanojn de UEA elektas – surbaze de la rekomendo de la Estraro – la Ĝenerala kunveno el la membroj de HEA.

Ĉapitro 8

Havaĵo kaj mastrumado de la Asocio

1. La Asocio mastrumas surbaze de jara buĝeto, kiun akceptas la Estraro. Pri la mastrumado de la Asocio la Estraro faras raporton, kiun ĝi submetas por akcepto al la Ĝenerala kunveno.
2. La enspezoj, necesaj por la funkciado de la Asocio, estas la jenaj:
 - a) kotizoj;
 - b) subvencioj de privataj kaj juraj personoj;
 - c) enspezoj el la ekonomia, entreprena, libroeldona, lingvoinstrua agado de la Asocio;
 - d) enspezoj el aranĝaĵoj
 - e) ceteraj enspezoj.
3. La Asocio mastrumas memstare per siaj enspezoj, respondecas por siaj ŝuldoj per sia havaĵo. La membroj de la Asocio ne respondecas por la ŝuldoj de la Asocio – krom pagi la kotizon kaj damaĝojn kaŭzitajn de ili.
4. La Asocio difinas la enspezojn el sia entreprena agado surbaze de la validaj leĝoj pri la mastrumado de sociaj organizoj.
5. La Asocio traktas siajn monrimedojn en konto malfermita en moninstituto.
6. La havaĵon de la Asocio konsistigas kontanta mono, monpostuloj, moveblaĵoj kaj nemoveblaĵoj.

7. Por la celkonvena kaj al la financaj preskriboj, juraj normoj konforma uzo de la en la buĝeto aprobitaj sumoj respondecas la personoj, havantaj asignan rajton.

8. Depende de la antaŭjare anoncita nombro de siaj membroj kaj proporcie al la kotizoj, pagitaj por la membronombro la organizaj unuoj povas ricevi – depende de la materiala situacio de la Asocio – el la centra buĝeto de la Asocio subvencion, per kiu kaj per siaj ceteraj enspezoj ili memstare mastrumas.

9. La dispozician rajton pri la bankkonto de la Asocio rajtas praktiki la Prezidanto **memstare kune kun la Ĝenerala Vicprezidanto aŭ la Ekonomia Vicprezidanto**, plue la Ĝenerala Vicprezidanto kaj la Ekonomia Vicprezidanto kune.

10. Se la Asocio praktikas investan agadon, ĝi devas kompili investan regularon surbaze de § 45 de la Leĝo de la jaro 2011 n-ro CLXXV pri la funkciado kaj subteno de civilaj organizoj, kiun, post aŭskulto de la opinio de la Revizia Komisiono, la Ĝenerala kunveno devas akcepti.

Ĉapitro 9

Publikeco de la funkciado de la Asocio

1. La funkciado de la Asocio estas por ĉiu publika. La Asocio publikigas la uzmanieron de siaj servoj, siajn raportojn, informojn pri la funkciado de sia organizo en la oficiala retejo de la Asocio.

2. La Prezidanto de la Asocio devas zorgi pri la enrigardo en la dokumentojn, estiĝintajn lige kun la funkciado de la Asocio, kaj li devas doni informon pri ili. La peticion pri enrigardo en la dokumentojn oni devas sendi skribe al la Prezidanto.

3. La ceteraj dokumentoj, rilataj al la funkciado de la Asocio, estas alireblaj en la sidejo de la Asocio en anticipe akordigita tempopunkto. Pri tio zorgas la Prezidanto.

4. La Estraro devas starigi apartan registron pri la enrigardo en la dokumentojn, el kiu konstatablas la nomo de la petita dokumento, tempo de la peticio kaj ties plenumo.

5. La servojn de la Asocio oni povas uzi laŭ peticio aŭ ankaŭ post persona sinturno. La Estraro kolektas la alvenintajn peticiojn kaj kvalifikas ilin laŭ tio, kiom ilia plenumo servas la celojn de la Asocio. La peticianoj povas aliri la petitajn servojn laŭ prioritato, starigita de la Estraro, en kvanto dependa de la mezuro de la uzebla havaĵo kaj disponeblaj materialaj rimedoj.

6. La Asocio rajtas anonci konkurson por la uzo de certaj servoj de la Asocio. La konkursanoncojn oni devas publikigi en la retejo de la Asocio. La konkursanonco devas enhavi, surbaze de kiuj vidpunktoj la Estraro alprenas decidon ĉe la prijuĝo de la por la uzo de la servoj prezentitaj konkursaĵoj. Pri la rezulto de la konkurso oni devas informi la konkursantojn en maniero, skribita en la anonco per adresa letero.

7. La registritaj datumoj de la Asocio – inkluzive de la forstrekitaj datumoj, raportoj aprobitaj de la Ĝenerala kunveno kaj ĉe kontorevizio ankaŭ la revizoraj raportoj – estas publikaj. La aktoj de la Asocio, submetitaj al tribunalo, inkluzive la ankoraŭ ne prujugitajn peticiojn kaj ties aneksaĵojn – escepte de la listo de ĉeestantoj en la fondokunveno kaj membraregistro de la Asocio – estas publikaj, iu ajn povas ilin vidi.

Ĉapitro 10

Ĉeso de la Asocio

1. La Asocio ĉesas:

- a) se la Ĝenerala kunveno deklaras la malfondon de la Asocio;
- b) se oni malfondas ĝin;

- c) se ĝi unuiĝas kun alia organizo;
- d) se la Asocio dividiĝas;
- e) se ĝia ĉeso estas konstatita.

Ĉapitro 11

Miksaj kaj finaj dispozicioj

1. Por demandoj, ne reguligitaj en la jena Statuto, estas sekvendaj la Regularo pri organizo kaj funkciado, la Leĝo de la jaro 2013 n-ro V pri la Civila Kodo, la Leĝo de la jaro 2011 n-ro CLXXV pri la unuiĝa juro, publikutila statuso, funkciado kaj subtenado de civilaj organizoj, plue la ĉiam validaj ceteraj juraj normoj.

Budapeŝto, la 22an de decembro 2021

.....
István Szabolcs, prezidanto
Hungaria Esperanto-Asocio

.....
János István Nagy, vicprezidanto
Hungaria Esperanto-Asocio

Parafita en Budapeŝto,, la 22an de decembro 2021 de

D-ro Dániel Pataki, advokato
Ĉambra Identiga N-ro: 36066941

La unuece strukturita teksto de ĉi tiu Statuto estas konforma al la enhavo, valida surbaze de la ĝeneral-kunvenaj decidoj kaj statutomodifoj de la 12a de decembro 2021, tuŝantaj **Ĉapitron 3, pp. 2.1.1, 2.1.6, Ĉapitron 5 p. 1.1.2 kaj Ĉapitron 8 p. 9** (*la modifoj estas markitaj per grasaj kursivaj literoj, la forstrekoj per trastrekoj*).

Mi parafas ĝin en Budapeŝto, la 18an de decembro 2016

D-ro Dániel Pataki
advokato